

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Multaj leteroj kaj salutkartoj de fidelaj geaŭdantoj atendas respondon. Ni hodiaŭ malfermas nian leterujon kaj respondas al ili. Se vi estas inter la skribintoj, aŭskultu bone, kiam venos via nomo !

El Budapeŝto (Hungario) venis poŝtkarto de sinjoro Paŭlo Balkányi, kiu diras: « *Kun intereso mi aŭdis vian prelegon pri edukado : **Esperanto-instruado**.* » Kaj li petas, se tio eblas, kopion, kiu povus esti utila al la Instrua Komitato de Hungara Esperanto-Asocio. Mi notas tiun peton, kaj tuj kiam miaj someraj ferioj estos permesintaj al mi akuratiĝi mian korespondadon, mi tajpos kopion de tiu prelego, kiu povas esti utila al niaj hungaraj samideanoj.

El Clermont-Ferrand (Francio) venis malfacile plenumbla peto de fraŭlino C. Huter, kiu mencias, ke ŝi estas longjara fidela aŭskultantino de niaj svisaj elsendoj. Ŝi dankas nin pro niaj interesaj prelegoj. Dankon pro la gratulo. Kaj jen la peto : Fraŭlino Hueter prizorgas la Internacian korespond-servon de UEA. Ŝi konstatis, ke la svisoj estas serĉataj kiel leter-amikoj, sed ke bedaŭrinde mankas disponeblaj adresoj. Ŝi petas nian helpon. Kiel UEA-delegito por la edukado mi ĉiusemajne ricevas petojn de korespondemuloj, kiuj vane serĉas svisan leter-amikon. Malgraŭ la bonvolo de la svisaj samideanoj ne eblas al nia landeto kontentigi ĉiujn korespondpetojn de la ekster-eŭropaj esperantistoj. En Svislando ne estas pli da loĝantoj, ol en Parizo. Malgraŭ tio, kiam japano, aŭstraliano, usonano aŭ brazilano deziras korespondi kun eŭropano, li tuj serĉas adreson de sviso. Ni ja scias, ke nia landeto estas interesege, pro la montaroj kaj belaj pejzaĝoj, pro la kvarlingveco kaj pro la kuriozaj enloĝantoj, kiuj ne ankoraŭ donis al siaj virinoj la voĉdonrajton, ktp. Sed fakte ni ne estas sufiĉe multnombraj por povi plenumi la dezirojn de miloj kaj miloj da korespondemuloj. Ili sin turnu al aliaj landoj kun same belaj montaroj kaj pejzaĝoj. Pardonu tiun respondon, sed sciu, ke en miaj tirkestoj kuŝas centoj kaj centoj da korespondpetoj, al kiuj mi neniam povis trovi respondemulojn. Svislando okupas sufiĉe altan rangon inter la esperantistaro, sed tio ne multnombrias la nombron de la svisa enloĝantaro.

El Zagreb (Jugoslavio) venas afabla vorteto kun dankoj pri nia elsendo pri la konstruiga laboro de la Verda Zagreba Observatorio, kiu iniciatis la restadejon Esperanto en Primoŝteno, kaj fondis interesoplenan revuon natursciencan *Homo kaj Kosmo*. Sinjoro doktoro Divjanoviĉ skribas : « *Nia grupo ĉe Observatorio kaj Homo kaj Kosmo varme dankas vin pro la samideana morala apogo !* » Ili aldonas : « *Ni firme esperas, ke en samideana kunlaboro ni povos atingi multajn bonajn rezultojn por esperanto kaj humanismo.* » Iliaj espero estas la niaj. Bonan sukceson tiun ĉi someron en Primoŝteno kaj longan vivon al la revuo *Homo kaj Kosmo*.

El Hexham (Britio) skribis gesinjoroj Brownlee. Ili ŝatis la elsendon pri la historio de la instruado de esperanto al la gelernantoj de mia vilaĝo La Sagne. Tiu elsendo parolis pri la ĝojo de la infanoj, kiam ili konstatis la eblecon paroli kun eksterlandanoj. Mi citis fraŭlinon Joŝiko Kaĵino kaj sinjoron Eizo Itoo. Gesinjoroj Brownlee ankaŭ gastigis tiujn simpatiajn geprelegistojn el Japanio. Ili mencias, ke Marjorie Boulton verkis *Kontralte* en ilia urbo Hexham. Dankon pro tiu agrabla saluto.

Jen tre interesa letero, kiu venis el Kanado. Sed unue mi volas doni kelkajn klarigajn vortojn. Niaj elsendoj en esperanto estas dissendataj por Eŭropo. La hazardo kondukis la 25-an de aŭgusto de la pasinta jaro la ondojn ĝis Kanado, kaj la hazardo permesis, ke esperantisto el Québec, sinjoro Roméo St. Pierre, ilin ne nur kaptu, sed registru. Li estis tre ĝoja, ĉar jam de tri jaroj li provis kapti Svislandon. La rezulto tamen ne estis tre agrabla. Li komprenis nur frazerojn. En raporto li skribis al ni ĉion, kion li komprenis. Vi vidos, ke la rezulto ne estas tre komprenebla. Jen mi legas al vi ĝian finon :

« ...aperis alproksime antaŭ du jarcentoj en mil sep cent sepdek du ... grandan ... en la modernan ... arton ... ideo ...natura inspiras la ... pedagogion. Tiun senpretendan prelegeton mi konkludas citante ... la grandan filozofon ... Memoru... ke, antaŭ ol aŭdaci entrepreni la edukadon de homo, necesas... Karaj aŭdantoj, vi... la proksiman semajnon. Profesoro Charles E. Kodell. »

Tiu profesoro Charles E. Kodell estas Charles Ecabert, mia antaŭulo. Vi scias, ke li mortis subite la 15-an de decembro 1962. Mi serĉis en liaj manuskriptoj, kaj mi fine trovis la tekston de la 25-a de aŭgusto de la pasinta jaro. Mi legas al vi la solvon al la raporta teksto de s-ro Roméo St. Pierre el Québec. La prelegtemo estis la edukaj ideoj de Jean-Jacques Rousseau. *« La eduka verko de Rousseau aperinta precize antaŭ du jarcentoj en 1762 portis grandajn plibonigojn en la modernan eduk-arton. Lia ĉefa ideo pri returno al naturo inspiras la hodiaŭan pedagogion. Ĝi troviĝas baze de la Ĝeneva Instituto pri Edukscienco, kiu portas la nomon Jean-Jacques Rousseau. Ties bonfamo kaj boninfluo radias en la tutmondon, kaj dank'al ĝi eternas la penso kaj la ago de Rousseau. Tiujn senpretendajn prelegetojn pri Rousseau mi konkludas citante lastfoje la grandan filozofon kaj edukiston : « Memoru, ke antaŭ ol aŭdaci entrepreni la edukadon de homo, necesas, ke vi mem estu iĝinta homo. »* Kaj profesoro Charles Ecabert salutis.

Raporto kiel tiu de nia kanada samideano estas tre interesa. Ĝi pravas la deziron de la esperantistoj havi radio-elsendojn, kaj pravas ankaŭ, ke tiu deziro ne estas nur pasiva, sed plene aktiva. S-ro Roméo St-Pierre petas klarigojn kaj se eble la plenan tekston de la kaptita elsendo. Tion li ricevos. Povu iam lia deziro havi la eblecon aŭdi regule nian voĉon esti rekompencita. Mi citas parton de lia letero : *« *En Kanado la radio-programoj en esperanto, kiujn ni ricevas, estas ege malmultaj. Tial, kiam ni, post multaj provoj dum tri jaroj, povas finfine ricevi iun, ni konigas tion al niaj karaj geamikoj por ke ili mem provu aŭskulti. »*

Ni ne elĉerpis la leterujon. Ĝin ni remalfermos venontan semajnon. Vi aŭdis elsendon de Radio-Svislando. Karaj geaŭdantoj, vin salutas Claude Gacond.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-